

Paul Gerhardt,
Wach auf, mein Herz und singe

Wach auf, mein Herz, und singe
dem Schöpfer aller Dinge,
dem Geber aller Güter,
dem frommen Menschenhüter.

Heut, als die dunklen Schatten
mich ganz umgeben hatten,
hat Satan mich begehret;
Gott aber hat's verwehret.

Du sprachst: "Mein Kind, nun liege.
trotz' dem, der dich betrüge;
schlaf wohl, lass dir nicht grauen,
du sollst die Sonne schauen."

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas PAUL GERHARDT
(*1607-03-12 – †1676-05-27).*

Arg-735-1483 (2012-12-28 19:08:46)

Paul Gerhardt,
Vekiĝu, mia koro

tradukita de Manfred Retzlaff

Vekiĝu, mia koro
Kaj kantu en adoro
Al via kara Dio,
Per kiu iĝis ĉio.

Ĉirkaŭis en malhelo
Min ombroj kaj malbelo,
Satano min deziris,
Sed Dio interiris.

Li diris: Nun senĝene
Pludormu, kvankam pene
Satano vin insidos,
Vi ja la sunon vidos.

*Traduko de la Germana poemo "Wach auf,
mein Herz und singe" de PAUL GERHARDT
(*1607-03-12 – †1676-05-27) en Esperanton
de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en
1983.*

*MR-055-1 / Arg-735-1484 (2012-12-28
19:09:55)*

*La origina germana-lingva kanto havas en-
tute naŭ strofojn. Ĝi troviĝas en la germa-
na luterana eklezia kantlibro kaj havas tie la
numeron 348.*